# TEJO-aktuale: numero 162, 2005-04-29

### Enhavo

EN LA NUMERO:


- SEMINARIO PRI KUNLABORO DE JUNULARAJ ORGANIZOJ MAJE EN LITOVIO
- SKRIBU ARTIKOLO(J)N: PRI FAMILIOJ, CIVILIZACIOJ KAJ TERORISMO
- EKSTERAJ RILATOJ GRAVAS POR VIDEBLIGI TEJO-N KAJ EO-N EN LA MONDO
- IJK - FESTU UNUECON EN DIVERSECO JUNE KAJ KUNE EN ZAKOPANE
- POŜTADRESO DE KONTAKTO KAJ TEJO TUTMONDE ŜANĜIĜIS!


## SEMINARIO PRI KUNLABORO DE JUNULARAJ ORGANIZOJ MAJE EN LITOVIO

TEJO invitas vin al la trejnseminario "Fari la diferencon kune - Junulara kunlaboro en Eŭropo", kiu okazos en la urbo Druskininkai en Litovio (ven/ven) 2005-04-29/2005-05-06. La ĉefaj celoj de la seminario estas firmigi kunlaboron inter diversaj junularaj Esperanto-organizoj de la pligrandiĝinta Eŭropo kaj formi reton de junaj aktivuloj, kiuj estontece respondecos pri la agado de landaj sekcioj kaj aliaj regionaj grupoj de TEJO. Pli da informoj vi trovos ĉe http://www.tejo.org/seminarioj/lit/ .

## SKRIBU ARTIKOLO(J)N: PRI FAMILIOJ, CIVILIZACIOJ KAJ TERORISMO

Kontakton, la buntenhavan revuon de TEJO, vi certe konas. Kontribuas al ĝi homoj el multegaj landoj pri plej diversaj temoj: por ke daŭre restu tiel, iĝu ankaŭ vi kontribuanto kaj skribu artikolon! La ĉefa temo de la dua numero de Kontakto estos FAMILIOJ (kun speciala atento al Esperantaj familioj, denaskismo ktp.). Kontribuu! La temoj de la tria kaj la kvara numeroj estos CIVILIZACIOJ (la tria) kaj TERORISMO (la kvara). Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj ege bezonataj! (Sendante ilin, atentu la suban anoncon pri la adresŝanĝo!)

## EKSTERAJ RILATOJ GRAVAS POR VIDEBLIGI TEJO-N KAJ EO-N EN LA MONDO

Multaj homoj-neesperantistoj aktivas en plej diversaj neregistaraj organizoj. Gravas, ke oni en tiu ĉi mondo vidu esperantistojn kiel aktivajn civitanojn, kiuj havas ion por diri kaj fari pri la plej aktualaj temoj de la hodiaŭa mondo! Komisiito pri KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO), Elisabetta CIRIO, invitas ĉiujn landajn sekciojn kaj lokajn klubojn aligi almenaŭ unu reprezentanton al la retpoŝta diskutlisto de KER: tejo-ker@yahoogroups.com . Tie ofte aperas detaloj pri trejnkursoj de Konsilio de Eŭropo aŭ de aliaj organizoj, kie TEJO-reprezentantoj povus partopreni. Por aliĝi al la listo, oni (ekzemple) sendu ajn-enhavan mesaĝon tejo-ker-subscribe@yahoogroups.com kaj poste respondu al la ricevita konfirm-petanta mesaĝo. Kiam vi aliĝas al la listo, bv. sin mallonge prezenti al la listanoj. Estos bone se TEJO estus reprezentita ĉe pluraj junularaj festivaloj/konferencoj en multaj landoj.

## IJK - FESTU UNUECON EN DIVERSECO JUNE KAJ KUNE EN ZAKOPANE

Internacia Junulara Kongreso, organize de TEJO kaj PEJ, okazos en Zakopane (PL) en la belega, malplej granda en la mondo grandmontaro Altaj Tatroj (dim/dim) 2005-07-31/2005-08-07, te. la unuan aŭgustan semajnfinon. Jam aliĝis 282 personoj, eble vi estos ĝuste la 300-a? aŭ 400-a? Atendas vin multegaj diskutoj pri la kongresa temo, ekskursoj kaj montaraj kaj en la salminejon en Wieliczka, prezentado de E-filmoj kaj tutnoktaj diskotekoj! Vi ekkonos ŝafojn, marmotojn, ĉamojn, ursojn, ŝafan kaj kapran fromaĝojn kaj ĉiujn aspektojn de egalrajteco! Por sperti tiun nekredeblan etoson, unue rigardu la detalajn informojn ĉe http://www.tejo.org/ijk/ kaj tie vi povas ankaŭ aliĝi!

**POŜTADRESO DE KONTAKTO KAJ TEJO TUTMONDE ŜANĜIĜIS!**

Ekde nun bv. sendi ĉiujn viajn (paperajn) leterojn al: Kontakto (aŭ TEJO Tutmonde), 16800 Phillips Rd., Alpharetta, GA 30004, Usono. Se vi jam sendis ion (papere), ne altrankviliĝu, la redakcio ĉiukaze ricevos viajn leterojn, sed kun ioma malfruo. La retadresoj estas kaj restas samaj: kontakto@tejo.org kaj tejo-tutmonde@tejo.org . Por scii kion precipe sendi, rigardu la supran mesaĝon pri temoj de la venontaj numeroj de Kontakto!